

Lignaĵhejtigilo Urba kaldronejo de Saâles



SAÂLES

La programo "énergivie" estas la traduko de la regiona engaĝiĝo favore al renovigeblaj energioj.

Celanta ĉiujn alzacanojn, ĝi emas al promocio de alternativaj energioj, ĉefe sunenergia kaj ligno-energia, kies potencialo estas grandega en Alzaco.

Subtenata de Eŭropa Unio, "énergivie" estas mastrumata de la regiona instanco, Région Alsace kaj de la agentejo pri naturmedio kaj energiŝparado ADEME.

La celoj estas ambiciaj sed realismaj. Fine de 2005, pli ol 33 000 m² de sunkatpiloj kaj 560 lignaĵhejtigiloj estis instalitaj en Alzaco.

n°6



Interparolado kun Jean Vogel, urbestro de Saâles

Kiaj estas la kialoj kiuj kondukis instali tiun lignaĵhejtigilon ?

Ĝis nun, la urbo posedis sep malsamajn hejtigilojn por provizi je varmo sep konstruaĵojn. Krome, la mazuta varmiginstalaĵo iĝis multekosta. Plie, kvar el tiuj instalaĵoj iĝis malnovaj. Ni profitis la nepran renovigon de la aparataroj por anstataŭigi mazuton per ligno. Estis elekto kohera kun nia politiko : nia vilaĝo situas en forstega ĉirkaŭo – 560 hektaroj de komunuma arbaro – kaj ni deziris utiligi lokan abundan kaj renovigeblan provizaĵon.

Kiaj estis la teknikaj devigoj ligitaj al tiu aparataro ?

Ni ĉefe devis persvadi tiujn kiuj kontraŭis tiun projekton. Ni kondukis gravan debaton por pravigi tiun investaĵon. La pejzaĝa integrado de la hejtigilo kaj la enigitaj avantaĝoj forigis la lastajn hezitemojn. Komencante la funkciadon de la nova instalaĵo, ni devis solvi la problemon de la kvalito de la provizo el lignaĵpecetoj. Ni bezonis trovi fidindan provizanton.

Kio karakterizas tiun instalaĵon ?


Naŭ urbaj konstruaĵoj, kvin domoj kaj du konstruaĵoj de kolektivaj loĝejoj estas provizigitaj de la hejtigilo. Komputika sistemo ebligas reguligi la temperaturojn kaj la periodojn de varmigado en la diversaj konstruaĵoj. Konsumadoj estas facile kalkuleblaj per kaloriaj komputiloj. Hodiaŭ, la hejtigilo uzas ĉiujare proksimume 500 tunojn de lignaj pecetoj anstataŭ 170 000 litroj de mazuto antaŭe. La ŝparado estas gravega : la kosto de ligna hejtado estas 30 procente malpli alta ol tiu de mazuto.

Estas ja ekzempla instalaĵo por la valo de la rivero Bruche ?

Fakte, nia vilaĝo estas la nura en la valo de la Bruche kiu realigis tian instalaĵon. Tio firmigas la pozicion de nia vilaĝo pri la temo de la daŭrigebla disvolviĝo. La lignohejtigilo estas ekonomia kaj turisma argumento. La intereso vekita per tiu instalaĵo ebligas pensi ke aliaj realigadoj sekvos : la Urbaj Komunumo de la "Haute-Bruche" (Alta-Bruche) projektas krei fabrikejon de lignaĵpecetoj.

❖ Kiel tio funkcias ?

La ligno, sub formo de pecetoj aŭ de granulaĵoj, estas deponita en stokujo. El tie, ĝi estas aŭtomate veturigita ĝis la hejtigilo dank'al senfina ŝraŭbo. Iu sistemo kontrolas la aereniron en la hejtigilo por regi bone la kvaliton de la brulado.



Hejtigilo kaj stokejo de ligno-pecoj



Ligno-pecetoj en la stokujo



Hejtigilo kun aŭtomata elcendrado kaj cendrujo

❖ DETALOJ DE LA SISTEMO

Mendinto

❖ Urbo de Saâles

Ekfunkciado

❖ 2005

Konstruaĵoj

❖ Hejtigita surfaco : 5 990 m²

Potenco de la ligna hejtigilo

❖ 500 kW

Potenco de la mazuta hejtigilo por sekureco kaj helpo

❖ 400 kW kun mazutujo de 8 000 litroj

Plej alta potenco necesa

❖ 850 kW

Volumo de la stokejo

❖ 300 m³

Volumo de la stokujo

❖ 30 m³

Produktado de cindroj

❖ 2 - 3 tunoj jare

Elcendrigilo kaj elpolvigilo de la fumo

❖ Aŭtomataj, kun enmetado de la cindroj en specialan cindrujon

Konsumado

❖ Jara energia bezono :

1 454 000 kWh

La ligna hejtigilo produktas 90 % de la energio uzante 2 100 m³ de lignaj pecetoj por la hejtada periodo 2005/2006 (01/10/05 - 01/06/06). La mazuta hejtigilo provizas la ceteron de energio, konsumante 5 000 l de mazuto

Naturmedia efiko

❖ 384 tunoj de CO₂ ne produktitaj jare
131 tunoj ekvivalento nafto ne konsumitaj jare

Kosto de la sistemo

❖ 827 331,47 eŭroj sen taksoj

Financado

❖ Région Alsace : 229 686,22 eŭroj (28,6 %)
ADEME : 212 454,00 eŭroj (26,5 %)
Urbo : 191 202,27 eŭroj (23,9 %)
Eŭropo (FEDER) : 168 745,00 eŭroj (21 %)

❖ SCII PLI PRI TIO

Kontakto Mairie de Saâles
Grand Rue
FR-67420 Saâles
Tél.: +33(0)3 88 97 70 26

❖ Niaj dokumentoj

- Gvidlibreto pri renovigeblaj energioj
- Slipoj pri subvencioj
- Teknikaj slipoj

❖ **Nia retejo**
www.energievive.fr

▶ N° Vert 0800 60 60 44



énergivie estas programo de novigado iniciita de la Regiona Konsilantaro de Alzaco por disvastigi renovigeblajn energiojn en Alzaco, kun subteno de ADEME kaj Eŭropa unio.